



Laĉi fiere fotiĝas kune kun korusanoj je UK de Vilno 2005.

Jam pasis alia jaro, kaj la Internacia Koruso plenumis sian fidelan rendevuon kun la koncerna UK. Ni diru, ke la nuna Korusestro, S-ro Laĉezar Kraŝtev faris egan forton klopodi sonorigi nin plej eble kiel bele, sed kondiĉoj ne multe helpis. Inter tiuj kondiĉoj mi starigas tiujn ekonomiajn: certe UEA ne apogis nin per senpagan fotokopiojn, sed eble la problemo estas ne vere pri UEA, sed pri la procedo: veras, ke ekzistas asocio de UEAanoj, kiuj interesiĝas pri muziko, kaj laŭ mi koncernas al tiu asocio, la Muzika Esperanto-Ligo, la provizorado de materialaj rimedoj por ke la koruso povu dece agi en niaj kongresoj. Mi ankoraŭ ne sukcesis legi la statuton de nia asocio –tamen, se mi atingas ilin, mi certe publikigos ilin ĉi tie– sed ne eskapas al mia kompreno tio, ke ĝi estas baza celo de nia asocio. Baze, la anoj de nia asocio, MEL, estas ni ĉiuj, kiuj en Universala Kongreso ne povas ne partopreni nian komunan kantadon, montrante per tio la veran sintenon de ĝisostaj esperantistoj. Ankaŭ estas tiuj, kiuj ne partoprenas nian IK-on pro tio, ke ili ne povas ĉeesti la kongreson universalan pro tio, ke mankas al ili la mono aŭ la sano veni. Al tiuj ankoraŭ estas la ebleco aliĝi nian asocion,

kaj per iliaj kotizoj ili daŭre povas esti kun ni en nia kongreso, ĉar danke al la mono, kiun ili pagas malavare, nia asocio povas provizi al la korusanoj per la koncernaj muzikaj notopaperoj. Dankon al ili.

Tamen, estas vere problemo tempa al niaj korusanoj: kiel prepari en nur kelkaj tagoj programon imponan, kun ĉirkaŭ dek kantoj? Vere la fondinta majstro, S-ro Dimitar Terziev, vere atingis tion, kaj li miraklis, mi memoras, en Universalaj Kongresoj, kiujn mi partoprenis, kiel tiuj de Montpeljero '98 aŭ Kroatio '01, kaj ankaŭ la nova estro, disciplo de S-ro Terziev, nia Laĉi, en Vilno '05. Sed tio malhelpis niajn korusanojn partopreni en aliaj aranĝoj interesaj de nia UK. Kie trovi solvon? En erao de interreto, la solvo estas evidenta: oni kreu TTTejon, kie ni *pendos* la koncernajn *partiĉelojn* sufiĉe antaŭe, kaj ni pristudu ilin ĉe ni per niaj personaj rimedoj. Poste, ni venu al UK kun nia *hejmtasko* jam pretigita.

Tiu ĉi ligilo kunigu nin ĉiujn por nia kanto!

Jesuso

Kuniĝu ni per nia kant'!

Prezidanto: David Gaines, Usono.
 Vicprezidanto:
 Sekretario:
 Kasisto:
 Voĉdonanto1:
 Voĉdonanto2:
 Voĉdonanto3:
 Redaktoro: Jesuo de las Heras, Hispanio.

La antaŭa manĉeto havas vakantajn postenojn. Nun estas nur certe, ke estas Prezidanto de Muziko Ligo de Esperanto, ĉar laŭ li, David Gaines estis elektata Prezidanto de nia asocio en kunveno en Tampere. Mi memoras, ke tion oni ne sciis en la kongreso de Kroatio, je 2001, kie Dimitar Terziev rolis kvazaŭ Prezidanto. Tiukongrese, en kunveno de MEL, li agnoskis la interretan paĝon pri MEL, kiun mi mem faris, kaj li asertis, ke mi devus esti vicprezidanto de MEL. Oni, tamen ne voĉdonis pri tio, kaj mi sekve ne konsideras min tia, eĉ se mi dankas tiun sopiron de nia estinta majstro.

Estas praktike, ke ni defendu la rajton de S-ro Gaines, kaj petu lin, ke li de nun agu kiel Prezidanto de nia asocio, kaj diru al ni pri liaj iniciatoj pri ĝi. Se **ne fizike**, ni povas kunveni **virtuale**, kaj solvi la nunan stagnan staton de nia asocio. Unue, ni trovu la ceterajn postenulojn de nia asocio, ĉar ĝi devas vigli kaj ekezisti denove. Due, ni faru programon pri agado de nia asocio. Trie, ni plenumu ĝin. Ne povas okazi denove, ke en Universala Kongreso, ne estas kunveno de MEL. Ne povas okazi, ke la Koruso Internacia funkciu per si mem. Ne povas okazi, ke de kongreso al kongreso MELanoj kaj korusanoj rilato neniel inter si.

Kiel efektiviĝi tion? Jen la programo bezonata de la nuna estraro de MEL. Ŝajnas, ke la estraro nuna de nia asocio konsistas el Prezidanto, kiun oni elektis antaŭ longe, kaj redaktoro de ĉi tiu bulteno, kiun neniu elektis ĝis nun. Pro tio mia rolo nuna estas tute provizora kaj sinpropona. Se estas alia homo,

kiu faru tiun ĉi taskon, mi estos plej dankema, ĉar mi jam redaktas du aliajn magazinojn esperantajn, **Kajeroj el la Sudo kaj Ateismo**. Dum oni ne trovas alian solvon, mi povas redakti ĉi tiun flugfolion, pro tio, ke estu iel rilato inter nia asocioj. Mi konsilas, ke oni tuj pagu la kotizon de MEL per nia UEAa konto, kaj tiel ni postulu, ke la asocio denove ekfunkcios.

Esperante, ke mi trovas eĥon en bonvolo de antaŭaj MELanoj, mi elkore salutas vin ĉiujn,

Jesuo de las Heras



Hotelo Reval estis la ĉefa kongresejo en Vilno 2005

9.

R E E Ĉ E M I / Disigo!

Animato Havaja kanto Solistoj Aranĝis: Dimitar Terziev

Enkonduko

1. A - pud al - ta ro - ko de l' mon -
tar' nu - be - to ŝve - bas en a - er', su - be
va - lo be - la kaj flo - rar' pri di -
si - go ni - a flu - stras dum ves - per'.

S
A
T
B

Rekantajĝ. Ĥoro

Nun a - di - aŭ kaj la vent' for - blo - vos la sus - pi - ron de l' ĉa - gren'

Nun a - di - aŭ kaj la vent' for - blo - vos la sus - pi - ron de l' ĉa - gren'

post bra - ku - mo ar - da de pa - si' vi es - tos for de mi

post bra - ku - mo ar - da de pa - si' vi es - tos for de mi
(ree ĉe mi)

1. Apud alta roko de l'montar'
nubeto ŝvebas en aer',
sube valo bela kaj florar'
pri disigo nia flustras dum vesper'.

2. Senton de la dolĉa amolor'
mi portos ĉiam en la kor',
renkontiĝos ni dum la estont',
ĉar ne granda estas nia bela mond'.

Rekantajo: Nun adiaŭ! ... kaj la vent'
forblovos la suspiron de l'ĉagren',
post brakumo arda de pasi',
vi estos for de mi!

(2) vi estos ree ĉe mi!



Laĉer gvidas nian kanton

Kuba Ĥuljan' estis vera muzika animo de nia kongreso. Li muzikis surkoridore dum la tuta kongreso, kaj je nia koncerto, tiu de la Internacia Koruso, ni paŭzis tiel ke li povu kanti tri kantojn –kun biso– por regali nin ĉiujn, ĉar la organizado de la UK ne antaŭvidis tempon por koncerto aparta por li.

Mi proponas, ke en la estonto MEL mem zorgu pri tiuj artistoj, kiuj aperas individue en la kongreso, kaj adoptu ni ilin, ĉar en nia etoso esperanta ne multas la klopodo artismomuzika. Mi ne proponas, ke oni gvidu, sed tion, ke ni apogu tiujn samideanojn, por kiuj arto estas natura emo, sed ne trovas sufiĉe da eĥo ĉe la Kongreso mem pro tio, ke la LKK devas zorgi pri tiom multe da aferoj. Simila kazo al tiu de Julián, sed malpli rimarkata, estis tiu de juna japanino, kiu surstrate regalis nin per sia ludado de tipe japana gitaro, ekster la kongresejo, kaj kiun ni vidas dekstre en ĉi tiu paĝo, kune kun la pozitivan etoson, kiun ŝi kaj ŝiaj kunantoj kreis.

